

Dieter Trautwein,  
Benu nin, Sinjor'

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1.) Benu nin, Sinjor',  
ke ni ne disiĝu.  
Ke ni estu viaj,  
ni plikonsciĝu.  
Solaj estas ni  
sur la Ter' neniam;  
ridon, ploron, ĉiam  
ilin benos vi.

2.) Mem ne povas iu  
benon akapari;  
ĉar vi donas multe,  
ni ne devas ŝpari.  
Flori povas ben',  
kie ni disdonas,  
amas kaj pardonas;  
iĝas for ĉagren'.

3.) Pacon vi jam donis,  
sed ĝi fariĝendas,  
inter ni ĉi tie  
efektiviĝendas.  
Helpu ĉiam nin,<sup>3</sup>  
ke ni faru pacon.  
Donu vian gracon,  
ke ni ĝuu ĝin.<sup>4</sup>

...

Dieter Trautwein,  
Komm, Herr, segne uns

1. Komm, Herr, segne uns,  
dass wir uns nicht trennen,  
sondern überall  
uns zu dir bekennen.  
Nie sind wir allein,  
stets sind wir die Deinen.  
Lachen oder Weinen  
wird gesegnet sein.

2. Keiner kann allein  
Segen sich bewahren.  
weil du reichlich gibst,  
müssen wir nicht sparen.  
Segen kann gedeihn,  
wo wir alles teilen,  
schlimmen Schaden heilen,  
lieben und verzeihn.

3. Frieden gabst du schon,  
Frieden muss noch werden,  
wie du ihn versprichst  
uns zum Wohl auf Erden.  
Hilf, dass wir ihn tun,  
o wir ihn erspähen –  
die mit Tränen säen,  
werden in ihm ruhn.

...

---

<sup>3</sup>aŭ:

Helpu ĉiam nin,  
ke fariĝu paco.  
Agu ni sen laco,  
ke ni ĝuu ĝin.

<sup>4</sup>aŭ:

Helpu ĉiam nin,  
en laboroj pacaj.  
Ni ne iĝu lacaj,  
ĝis ni ĝuos ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Komm, Herr, segne uns" de Dieter Trautwein en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1983-06-01.*

*MR-065-01 / Arg-741-1496 (2012-12-30 16:47:10)*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Dieter Trautwein, publikigita 1978.*

*Arg-741-1495 (2012-12-30 17:00:37)*

*Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Dieter\\_Trautwein](http://de.wikipedia.org/wiki/Dieter_Trautwein). Tiu verkis ankaŭ la melodion. La kanto troviĝas en la evangelia, protestanta germana kant-libro. n-ro 170.*